

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj 2³/₁₂.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 % rabato por duonjaraj, 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 5 (41)

la 20:an de septembro 1899

IV:a jaro.

Kelkaj konturoj de vojaĝo esperantista rapide desegnitaj.

Inviton al edziĝa festo? Jes, certe.

Mi volas rakonti al vi, kiamaniere tio ĉi rilatas.

Li estas esperantisto. Tial mi konatiĝis kun li. Ni korespondadis unu kun la alia dum ĉirkaŭe unu jaro. Komence la leteroj estis mallongaj mendoj je verkoj esperantistaj k. c., sed iom post iom ni okaze kaj nerimarkate alproksimiĝis pli kaj pli, ni konfidigis reciproke, kiamaniere ni fariĝis adeptoj de Esperanto. Kaj je unu bela tago ni estis amikoj. Granda akvo disigas niajn landojn, neniam ni vidis unu la alian.

Nun li edziĝos, kaj invitis min al la festo. Ĉu mi vojaĝos trans la maron, for al la malvarma nordo?

Mi prenis la jesan decidon, telegrafis, kaj aranĝis por la vojaĝo.

En la merkredo, 19 de aprilo, mi forlasis mian hejmon kaj alvenis al la sveda ĉefurbo. Ĉe la stacio renkontis min esperantista amiko s-ro K., en kies akompano estis farita unu vizito en "Skansen", kulturhistoria muzeo kaj bestoĝardeno. Tie ni interparolis kun laplandana familio en sia nacia tendo kaj rigardis la glacimarajn ursojn plezure naĝantajn kaj ruliĝantajn en la akva kavo de la kaĝego.

Antaŭ la deiro de l' vaporŝipo s-ro L. — la konata sveda esperantisto — venis por liveri leterojn kaj salutojn, kiujn mi transdonu al liaj amikoj kaj estontaj parencoj trans la maro.

La ŝipo ekfajfis. Ni disiĝis, kaj mi lasis mian patrolandan bordon, balancante la manon al la amiko foriranta.

En la mateno sekvanta la vaporŝipo alordiĝis en Åbo, kaj montrinte la internon de mia valizo en la fremdlima depagejo, mi tuj trovis veturigiston,

al kiu mi diris la du finnajn vortojn, kiujn solajn mi sciis kaj kiujn lernigis al mi s-ro L. — “*Mikä?*” li respondis. Kvankam mi ne komprenis la signifon de l' vorto, mi tamen vidis la demandantan esprimon de lia vizaĝo. Mi ripetis mian lernitaĵon. Kaj sekvis la efiko dezirita: post deko da minutoj la kaleŝo haltis antaŭ la pordo de l' gesinjoroj B.

Ĉe ili mi estis akceptata tiel gastame kaj bonvole de ĉiuj anoj de la familio, ke mi sentis min preskaŭ konfuzita. Se, krom tio, mi sciigas, ke ĉiuj kleraj finlandanoj parolas mian nacian lingvon kaj multaj el ili rigardas ĝin sia patra, la leganto povas kompreni, ke mi ne havis kaŭzon konscii, ke estas en lando fremda.

Estis griza tago de finiĝanta norda vintro. Malgaje kaj peze pendis la nuboj super la “lando de lagoj mil”; plendantaj kaj senpacaj kuregis tra la stratoj la ventoj de la granda malproksima kampo; sed la arboj centjaraj ĉirkaŭ la grandaĝa katedralo staris seriozaj, trankvilaj; nur mallaŭta murmuro estis aŭdata de l' suproj la ĉielon rigardantaj.

La esperantiston s-ron R. mi serĉis, sed ne trovante lin en sia hejmo, mi lasis mian karton kun saluto, kiun mi renovigas per tiuj ĉi linioj.

Estis mia intenco daŭrigi en tiu sama tago la vojaĝon, sed dank' al la afabla invito de miaj gemastroj la foriro estis prokrastite ĝis la sekvanta mateno, kiam la vagonaro portis min for al Tammerfors, kie mi restis de l' tagmezo al la mezo de l' nokto. En tiu ĉi urbo mi ne konis eĉ unu personon. Estas stranga la sento esti fremdulo! Mi iradis tra la stratoj, rigardis la riveron ŝaŭmantan, fabrikojn, domojn, laboristojn diligente okupitajn.

Jen iras policisto. Mi demandas lin por trovi la telegrafejon. Li respondas per longeta parolo en sia finna lingvo, kiu tonas kvazaŭ la plaŭdo de l' ondoj apud la bordo aŭ la unutona kanto de l' vento karesanta l' arbaron. Dum kelke da momentoj mi staras aŭskultante la sonoron de l' vortoj, sed tiam mi ekridas. Li rimarkas, ke mi nenion komprenis. Kaj ni ridas ambaŭ.

En la vespero mi alestis en la Domo Societa ĉe teatra prezentado de l' fabelo pri la *Princidino Roza* de Topelius. Mi ne komprenis upu vorton el la replikoj, tamen estis por mi plezuro. Kredeble ĝi estis amatoraĵo de junularo el la societo. La plimulto de l' rigardantoj estis infanoj, kun ili estis patrinoj kaj malpli junaj fratinoj, ankaŭ unu kaj unu patro de familio; finne aŭ svede ili parolis inter si; kaj dum la paŭzoj la malgranduloj ĉirkaŭkuris ludante en aminda brueto, kiu tamen neniam fariĝis laŭta kaj viva.

Noktmeze mi sidis en la vagonaro atendante ĝian ekiron. Inter la malmultaj personoj en la vagono sin trovis ankaŭ unu vilaĝano. Li ne estis malsobra, kvankam li do kredeble estis gustuminta iom la fluidaĵon, kiun entenis lia kruĉo. Unu virino subdiris ion al sia akompananto. Tiu eliris. Policisto envenis kaj elpelis la vilaĝanon kun la kruĉo. — La imago de l' mizera maljunulo persekutis min dum multaj horoj. Ĉu li havis monon por loĝo dum la nokto? Kio li fariĝis? Kiaj estis liaj pensoj en la malvarmo? — Mi longtempe portis malbonan konsciencon pro tio, ke mi ne propretante lin savis.

Antaŭ mi estas nun longa vojo, ĉar mi iros ĝis la norda finpunkto de l' fervojo; post senĉesa kurado, nur interrompita per la mallongaj haltoj ĉe la stacioj, la vagonaro atingos Uleåborg morgaŭ vespere je la horo deka.

La tempo pasas malrapideme, kiam oni vojaĝas sola, kaj tute sen interparolanto oni enuas fine. Tiel ankaŭ mi. Sed ne daŭris longe, ĝis mi malkaŝis, ke unu mia kunvojaĝantino en tiu vagono estas... la fratino de mia

estonta mastro en U., ke ŝi, kiel mi mem, iros al lia edziĝa festo. Tio estas ja stranga renkonto, tiom pli, ke nek ŝi nek mi antaŭe sciis eĉ pri la ekzistado de la alia.

En la stacio K. mi tagmanĝis kaj poste promenadis iom antaŭ la stacidomo. Tiam la staciestro venis al mi, ekdirante mian nomon. Komprenoble ke mi ekĝojis trovi nefremdulon. Pri mia alveno li sciigis de unu konata kun li esperantisto, kaj rekonis min laŭ portreto, kiun posedas de mi la dirita esperantisto, mia amiko. Li havis la amindecon inviti min en sia loĝejo, kaj dum la minutoj de la haltado ni sidis interparolante kaj ĝnis punĉon kun sudaj fruktoj. Li komence estis neamika je nia lingvo, al kiu la dirita mia amiko penadis konverti lin, sed sendube li baldaŭ estos bona esperantisto ankaŭ li.

Malfrue en la vespero de l' sabato ni alvenis en U.

La renkonto kun mia esperantista amiko kaj liaj parencoj estis nepri-skribeble kara; ĉiaj detaloj en mia estado ĉe li kaj ili estis tiel agrablaj kaj memorindaj por mi, ke mi ne povos doni al miaj sentoj la plenan esprimon per iom da malperfektaj vortoj. Tial, pardonu min, ke mi tre ŝpare rakontas pri la du tagoj, kiujn mi pasigis en tiu urbo, kie la neĝo kaj glacio kaj vintra malvarmo nur servas por doni al la homa koro varmegon kaj amikecon, entuziasmon je la bono kaj fidelecon je la idealoj.

S-ro L. kaj lia bopatro portadis la esperantistajn signojn; mi ne — pro tio ĉi mi hontis.

En la edziĝa festo, kiu fariĝis en la vespero de l' dimanĉo, mi havis la plezuron eldiri al la fianĉo kaj fianĉino per malgranda parolo en nia esperanta lingvo saluton de niaj samideanoj en mia hejma urbo kaj lando, kies sola reprezentanto tie mi estis, kaj deziri al ili feliĉon kaj prosperon familian kaj nacianan. — Aminda edzino, edzo amikema! Neniam mi forgesos la belan vidon de via trankvila feliĉeco! Ĉiam restos en mia memoro la junecaj gepatroj de l' fianĉino, kiuj festis en la sama tago la jubileon de sia dudek-kvinjara edzeco! Dio donu al vi eternan printempon!

Post agrabla kunestado en la lundo, mi lasis la uleoborjajn amikojn en la sekvanta mateno. Multaj el ili alestis ĉe la stacio. Ni diris la lastan adiaŭ, kaj inter ambaŭflanka balancado de ĉapeloj kaj poŝtukoj la vagonaro kuris for suden.

En la tagmezo de l' merkredo la finlanda ĉefurbo sin montris al mia vido. Tie s-ro G. E., bofrato de mia mastro en U., venis al mia renkonto ĉe la stacio. En lia akompano mi pasigis la ok horojn de mia haltado en Helsingfors. Ne estas tie ĉi la loko priskribi ĉion, kion mi sentis, aŭdis kaj vidis, rigardante la belajn konstruaĵojn de la urbo, la ĉirkaŭaĵojn dum malgranda kaleŝa veturado, la homojn en la stratoj. — Sed kial do ĉiuj sinjorinoj portas funebran veston; kial do la infanoj tiel mallaŭte ludadas en la bulevardo apud la statuo de Runeberg, la granda poeto glora de Finnlando?

La tempo mallonga bedaŭrinde ne permesis al mi konatiĝi kun pli ol du tri el la esperantistoj tie loĝantaj.

Rapide kuregadas la tempo. Renkonti, disiri — tiel estas la necedanta neceso de l' vivo.

Adiaŭ, lando tiom kara! Malgaja estas via vintro kiam la nokto forpelas eĉ la tagon; mi pli amas vidi vian someron, kies nokto sub la somermeza suno lumanta sur viaj eternaj firmaj montoj, sur viaj malhelaj arbaroj kaj lagoj sennombraj estas nur komenco de nova tago pli bela ol la jam pasinta!


Tuŝante la pluajn spertaĵojn de mia vojaĝo, per fervojo al Hangö kaj per vaporŝipo al Stokholmo, nenio rimarkinda estos rakontata.

Se tiu ĉi malgranda rakonto ne estas tiom interesa, kiom mi deziris ĝin fari kaj vi, kara leganto, atendis, tio dependas de du kaŭzoj: unue mia malkapableco skribi interese, kaj due plej — ke la saĝo malpermesas al mi eldiri tion, kion mi tiel varme, intensive sentas en la intima profundo de mia animo.

Dank' al Esperanto mi vidis je la unua fojo tiun nacion, por kiu niaj koroj frapas per duoblaj frapoj.

Upsala en aprilo 1899.

Paul Nylén.




Novaĵoj.

Nova literaturo.

Al la skandinavaĵ, precipe la svedaj, esperantistoj ni kun plezuro sciigas, ke la dua eldono de la vortaro *sveda-esperanta* estas nun en presado. Tiu ĉi verko jam tro longe mankis, kaj ĝia foresto bedaŭrinde malakcelis la propagandon en Svedujo. La nova eldono, kiu estos aĉetebla en la fino de oktobro, havos tian saman formaton, kiel la esp.-sveda vortaro, kaj kostos 60 oerojn.

La angla eldono de la verko N:ro 86: "*A few words on the international language Esperanto. Translated by R. H. Geoghegan, after the Russian of Dr. L. Zamenhof.*" Eldonita per la Kapitalo de D:ro Zamenhof, estas nun presita, kaj aĉetebla ĉe la Societo "Espero" en S. Peterburgo aŭ ĉe la Klubo Esperantista en Upsala.



La kanto de l' animo.

Dio kreis la animon
de la homo en la mondo
por ke doni la esprimon
de l' ideo en la ondo
de la sonoj, de l' koloroj,
en la lumo kaj la varmo...

Kantu al ni pri la floroj,
kantu pri l' beleco, ĉarmo!

La animo de la homo
en la kantoj, pro la vero,
ĉie gloras Dian nomon,
ĉie gloras sur la tero!
*Kiu kredas je la Dio,
tiu amas la verecon...*


Kantu al ni, kara mia,
kantu al ni la bonecon!

Kantu al ni! Dio granda
la talenton al vi donas,
por ke do en ĉia lando
via kanto bele sonas!
en la vivo laborema
kantoj estas la ornamo...

Pro la Dio pardonema,
kantu al ni pri la amo!

Melitopol en Rusujo. 24/X—6/IX 1898.

J. N. Podrjabinnikov.



Fransuazo.

(Laŭ *Maupassant*.)

Verkis L. N. Tolstoj.

La 3-an de Majo de la jaro 1882 el Havro fornaĝis en la Kitajn marojn trimasta ŝipo "Dipatrino de la ventoj". Ĝi fordonis la ŝarĝon en Kitujo, akceptis tie novan ŝarĝon, forkondukis ĝin en Buenos-Ajreson kaj de tie ĝi venigis la komercaĵojn en Brazilujon.

La transveturadoj, difektoj, rebonigoj, haltigoj po kelkaj monatoj, ventoj forkondukantaj la ŝipon de la vojo, maraj aventuroj kaj aliaj malfeliĉoj haltigis la ŝipon tiel, ke ĝi naĝadis kvar jarojn sur fremdaj maroj, nur en la 8-a Majo de la jaro 1886 ĝi venis Marseljon kun ŝarĝo, konsistanta el ladaĵoj kun amerikaj konservoj. Kiam la ŝipo elveturis el Havro, sur ĝi estis kapitano, lia helpanto kaj 14 ŝipanoj. En la tempo de la vojaĝado mortis unu ŝipano, kvar perdiĝis ĉe diversaj aventuroj, kaj nur naŭ revenis Francujon. Anstataŭ la mankintaj ŝipanoj, oni dungis du amerikanojn, unu negron kaj unu svedon, kiun oni trovis en unu drinkejo en Singapuro.

Sur la ŝipo oni deprenis la velojn kaj kunligis la ŝnuregojn sur la masto kiel kruco. Subiris buksira vaporŝipo kaj, spiregante, fortrenis ĝin en la linion de la ŝipoj. La maro estis trankvile, ĉe la bordo apenaŭ ŝoviĝis la malgrandetaĵoj. La ŝipo eniris en la linion, kie staris laŭ la longeco de la bordo ŝipoj el diversaj landoj, grandaj kaj malgrandaj, de ĉiuj mezuroj kaj formoj. "Dipatrino de la ventoj" staris inter itala brigo kaj angla galeto, kiuj malvastiĝis, por doni liberan lokon al la nova kolego.

Kiam la kapitano disiĝis kun la depagejaj kaj havenaj oficistoj, li liberigis duonon de la ŝipanaro, por pasigi la nokton sur la bordo.

La nokto estis varma, somera. Marsejlo estis lumigita, sur la stratoj odoris la manĝaĵoj de la kuirejoj, de ĉiuj flankoj aŭdiĝis paroladoj, bruego de la radoj kaj ĝojaj krioj.

La ŝipanoj de la "Dipatrino de la ventoj" jam kvar monatoj ne vidis teron kaj nun, elirinte sur la bordo, timeme ili iris sur la stratoj, kiel fremdaj homoj, malkutimiĝintaj de urba vivo, ili ĉirkaŭrigardiĝis, ĉirkaŭflaris la stratojn, proksimajn al la haveno, kvazaŭ ion serĉante. Kvar monatoj ili ne vidis virinojn... Antaŭ ĉiuj iris Selestin Djuklo, forta kaj lerta bubo. Li ĉiam kondukadis aliajn, kiam ili suriris sur la bordon. Li povis trovi bonajn lokojn, povis ankaŭ disiĝi, kiam estis al tio ĉi bezono, kaj ne komencis bataliĝi, kio ofte okazas kun ŝipanoj, kiam ili estas sur la bordo; sed se la bataliĝo jam komenciĝis, li ne foriras de la kolegoj kaj povas sin defendi. Multe da tempo la ŝipanoj paŝis sur la mallumaj stratoj, kiuj, kiel defluo, delasiĝis al la maro kaj de kiuj odoris malbonegaj odoroj. Fine Selestin elektis unu mal-larĝan strateton, kie brulis sur la pordoj, elfleksitaj lanternoj, kaj eniris en ĝi. La ŝipanoj, montrante la dentojn kaj subkantante, iris post li. Sur la malbrilaj kolorigitaj vitroj de la lanternoj estis surskribitaj grandaj ciferoj. Sub la malaltaj plafonoj de la pordoj sidis sur pajlaj benketoj virinoj en antaŭtuko; ili elsaltis ĉe la ekvido la ŝipanojn kaj, elkurante sur la mezon de la strato, baris al ili la vojon kaj ĉiu forlogis en sian neston. Iajoje, en la profundo de la vestiblo subite malfermiĝis la pordo, el ĝi montriĝis duon-vestita virino en maldelikataj tolaj pantalonoj, en mallonga jupo kaj en velura nigra mamumo kun origitaj pasamentoj. "Hej, beluletoj, eniru!" kriis ŝi ankoraŭ de malproksime, kaj iajoje ŝi mem elkuris, kaptis unu el la ŝipanoj

kaj trenis lin per ĉiuj fortoj al la pordo. Ŝi ensuĉiĝis en li kiel araneo, kiam ĝi kaptis muŝon, plifortan ol si mem. La ŝipano apogis sin malforte, kaj la ceteraj haltiĝis, observante kio estos; sed Selestin ekkriis: "Ne tie ĉi, ne eniru, ni iru plu!" La bubo aŭskultis lin kaj kun forto liberiĝis de la virino. La ŝipanoj iris plu akompanataj per insultoj de la kolerigita virino. Laŭ la bruo elsaltis aliaj, ĵetis sin sur ili kaj per raŭkaj voĉoj laŭdis sian komercaĵon. Tiel ili iris plu kaj plu. Malofte ili renkontis soldatojn aŭ komizojn, rapidantajn en la konatan lokon. En aliaj stratetoj brulis ankaŭ tiaj lanternoj, sed la ŝipanoj iris plu kaj plu, paŝante tra la malbonodoranta saŭco, elirinta el sub la domoj. Sed jen Djuklo haltiĝis apud unu domo, plibona ol la aliaj, kaj enkondukis tien siajn kolegojn.

* * *

La ŝipanoj sidis en granda salono de la restoracio. Ĉiu el ili elektis por si amikino kaj ne disiĝis jam kun ŝi dum la tuta vespero; tia moro estis en la restoracio. Tri tabloj estis kunigitaj kune, kaj la ŝipanoj antaŭ ĉio trinkis kune kun la virinoj, poste ili iris kun ili supren. Multe kaj laŭte frapis la dikaj botoj de dekdu piedoj sur la arba ŝtuparo, ĝis ili traŝiris mallarĝajn pordojn, disiĝis kaj iris en apartajn ĉambrojn. De tie ili iris ree malsupren por trinki, poste ree supren en apartajn ĉambrojn.

La festeno estis granda. La tuta duonjara salajro perdiĝis en la kvar horoj de festeno. En la 11:a horo ĉiuj estis jam malsobraj kaj kun okuloj, plenigitaj de sango, kriis sensencajn vortojn, mem ne sciante kion. Unu kantis, dua kriis, tria frapis per la pugno sur la tablo, kvara trinkis vinon. Selestin sidis inter la kolegoj, kune kun li sidis granda, dika, ruĝvanga virino. Li trinkis ne malpli ol ĉiuj, sed ne estis ankoraŭ tiel malsobra; en lia kapo vagis iaj pensoj. Li delikatiĝis kaj serĉis ian pretekston por komenci paroladi kun sia amikino. Sed la pensoj venis al li kaj tuj foriris, li neniel povis ilin kapti, memori kaj eldiri.

Li ekridetis kaj diris: — "Tiel, efektive... jam longe vi estas tie ĉi?" — Ses monatoj, respondis la virino. Li klinis la kapon, kvazaŭ li aprobis ŝin por tio ĉi. — "Nu, kio do, estas al vi bone?" Ŝi ekpensis. — Mi al kutimiĝis, diris ŝi, oni bezonas ja ion. Almenaŭ pli bone, ol esti servantino aŭ lavistino. Li klinis per la kapo, kvazaŭ li aprobis ŝin ankaŭ por tio. — "Kaj vi ne estas ĉi tiea?" Ŝi ekbalancis per la kapo en signo, ke ŝi ne estas ĉi tiea. — "El malproksime?" Ŝi klinis la kapon. — "Kaj el kie?" Ŝi ekpensis, kvazaŭ memoriĝante pri io. — El Perpinjan' mi estas, diris ŝi. — "Tiel, tiel", ekparolis li kaj silentiĝis. — Kaj vi, kio do, estas maristo? demandis ŝi nun. — "Jes, ni estas maristoj." — Kio do, vi estis malproksime? — "Jes, ne proksime, ĉion ni vidis." — Kaj eble ĉirkaŭ la tuta mondo vi veturis? — "Ne nur unu fojon, sed preskaŭ du fojojn ĉirkaŭveturis." Ŝi kvazaŭ pripensis, memoriĝante pri io. — Mi pensas, ke vi renkontis multajn ŝipojn? diris ŝi. — "Kaj kio do?" — Ĉu vi ne renkontis la "Dipatrino de la ventoj"? Estas tia ŝipo. Li miriĝis, ke ŝi nomigis lian ŝipon, kaj li volis ŝerci je ŝi iom. — "Jes, en la pasinta semajno mi renkontis ĝin." — Ĉu efektive, demandis ŝi kaj blankiĝis. — "Estas vere." — Vi ne mensogas? — "Je Dio!" ĵuris li. — Nu, ĉu vi ne vidis tie Selestinon Djuklon? demandis ŝi. — "Selestinon Djuklon?" ripetis li kaj miriĝis, li eĉ ektimis. Kiel ŝi povis scii lian nomon? — "Ĉu vi konas lin?" demandis li; estis videble, ke ankaŭ ŝi ektimiĝis por io. — Ne. Ne mi, sed unu virino tie ĉi konas lin. — "Kia virino? De tiu ĉi

domo?“ — Ne, tie ĉi proksime. — “Kie do estas proksime?“ — Jes, tie ĉi ne malproksime. — “Kiu do ŝi estas?“ — Simpla virino, tia, kiel mi. — “Por kio do ŝi bezonas lin?“ — Kiel mi povas scii? Eble, ŝi estas lia samlandulino. Ili exploreme rigardis unu la alian en la okuloj. — “Mi volus vidi tiun ĉi virinon“, diris li. — Por kio do? Vi volas ion diri al ŝi? — “Jes, diri“ . . . — Kion diri? — “Diri, ke mi vidis Selestinon.“ — Kaj vi vidis Selestinon Djuklon? li vivas? li estas sana? — “Jes, li estas sana. Kio do?“ Ŝi eksilentis, ree kolektante la pensojn, kaj poste ŝi diris mallaŭte: — Kien do iras la “Dipatrino de la ventoj?“ — “Kien? en Marseljon.“ — Ĉu vere!? ekkriis ŝi. — “Vere.“ — Kaj vi konas Djuklon? — “Jes, mi diris ja ke mi konas lin.“ Ŝi ekpensis. — Tiel, Tiel. Tio ĉi estas bone, diris ŝi mallaŭte. “Por kio do vi bezonas lin?“ — Se vi ekvidos lin, diru al li . . . Ne, oni ne bezonas. — “Kio do?“ — Ne, nenio. Li rigardis sur ŝi kaj maltrankviliĝis pli kaj pli. — “Ĉu vi konas lin?“ demandis li. — Ne, mi ne konas lin. — “Kaj por kio do li estas al vi bezona?“ Ŝi ne respondis, subite desaltis de la genuoj, forkuris en la kontoron, kie sidis la mastrino, prenis citronon, distranĉis ĝin, elpemis la sukcon en glaso, poste ŝi enverŝis ankaŭ akvon kaj donis al Selestino. — Jen, trinku, diris ŝi kaj sidiĝis, kiel antaŭe, sur liaj genuoj. — “Por kio estas tio ĉi?“ demandis li preninte de ŝi la glason. — Por ke la malsobrecu forestu. Poste mi diros al vi. Trinku. Li trinkis kaj deviŝis la lipojn per la maniko. — “Nu, diru, mi aŭdas.“ — Ĉu vi ne diros al li ke vi vidis min, ĉu vi ne diros al li de kiu vi aŭdis tion, kion mi diros al vi? — „Nu, bone, mi ne diros.“ — Ĵuru! Li ĵuris. — Je Dio? — “Je Dio.“ — Diru al li, ke lia patro kaj patrino mortis, la frato ankaŭ mortis, estis febro, en unu monato ĉiuj mortis. Djuklo eksentis, ke la tuta sango malvastiĝis ĉe la koro. Kelkajn minutojn sidis li kaj silentis, ne sciante, kion diri, poste li diris: — “Ĉu vi scias tion ĉi ĝuste?“ — Jes, ĝuste. — “Kiu diris al vi?“ Ŝi metis la manon sur liaj ŝultroj kaj rigardis lin rekte en la okulojn. — Ĵuru, ke vi diros al neniu. — “Nu mi ĵuras. Je Dio!“ — Mi estas lia fratino. — “Fransuazo!“ ekkriis li. Ŝi atente rigardis sur li, kaj mallaŭte movis per la lipoj, preskaŭ ne ellasinte vorton. — Ĉu vi estas Selestino! Ili ne moviĝis, ŝtoniĝis, rigardante, kiel antaŭe, unu la duan en la okulojn.

Ĉirkaŭ ili kriegis la ŝipanoj per malsobraj voĉoj. La sono de la glasoj, frapado per la manplato kaj la akra krio de la virinoj intermiksiĝis kun la bruo de la kantoj. — “Kiel tio ĉi povas esti?“ mallaŭte, tiel mallaŭte, ke eĉ ŝi apenaŭ aŭdis liajn vortojn, li diris. Liaj okuloj pleniĝis kun larmoj. — Jes, ili mortis ĉiuj en unu monato, — daŭrigis ŝi. — Kion mi povis fari? mi restis sola. Por la ŝuldo al la doktoro kaj apoteko, por la enterigo de ĉiuj tri . . . mi vendis ĉion, pagis al ĉiu kaj mi restis sen mono. Mi estis servantino ĉe la sinjoro Kaŝo. Mi havis tiam la aĝon de 15 jaroj, kiam vi forvetis mi ja havis la aĝon de 14 jaroj. Kun li mi pekis . . . Poste mi estis vartistino ĉe la notario, kun li ankaŭ . . . en la komenco mi vivis je liaj elspezoj en lia loĝejo, sed ne longe. Li forĵetis min, tri tagoj mi vivis ne manĝinte, neniu volis min akcepti, kaj jen mi eniris tien ĉi, kiel aliaj. — Ŝi parolis kaj la larmoj kiel rivero fluis de ŝiaj okuloj, de la nazo, malsekigante la vangojn kaj enverŝigante en la buŝon. — “Kion do ni faris?“ diris li. — Mi pensis ke vi ankaŭ mortis, diris ŝi kun larmoj, ĉu mi estas kulpa. — “Kiel do vi ne ekkonis min?“ ankaŭ mallaŭte diris li. — Mi ne scias, mi ne estas kulpa, — daŭrigis ŝi kaj ankoraŭ pli ekploris. — “Ĉu mi povis vin ekscii? Ĉu tiam vi estis tia, kiel nun? por kio do vi ne eksciis min?“ Ŝi kun

malespero svingis per la mano. — Ah! mi ilin, la virojn, tiel multe vidas, ke ĉiuj estas ĉe mi egalaj. Lia koro kuntiriĝis tiel dolore, ke li volis krei kiel malgranda knabeto, kiam oni batas lin. Li leviĝis, forigis ŝin de si kaj kaptinte per siaj grandaj ŝipanoj manoj ŝian kapon, atente enrigardiĝis en ŝia vizaĝo. Iom post iom li eksciis en ŝi tiun malgrandetan, delikatan kaj ĝojan knabinecon, kiun li restigis hejme kune kun tiuj, al kiuj ŝi kovrigis la okulojn. — "Jes; vi estas Fransuazo! fratino!" diris li. Kaj subite malfacilaj ploregoj, similaj al singulto de malsobro, leviĝis en lia gorĝo. Li forlasis ŝian kapon, ekbatis sur la tablo tiel, ke la glasoj renversiĝis kaj disrompiĝis en pecetoj, kaj ekkriis per sovaĝa voĉo.

La kolegoj miriĝis kaj turnis sin al li. — Jen malsobro, diris unu. — Li kriegu, diris la dua. — Hej! Djuklo! por kio vi ploregas? ni ree iru supren, diris la tria, per unu mano tirante Djuklon, kaj per la dua ĉirkaŭprenante ŝian ridegantan, kun brilantaj nigraj okuloj, amikino, vestitan en velura roza malkovrita surtaliao.

Djuklo subite eksilentis kaj, kaŝante la spiron, ekrigardis sur la kolegoj. Poste kun tiu stranga kaj decida esprimo, kun kiu li komencis bataliĝi, li, ŝanceliĝante, aliris al la ŝipano, ĉirkaŭpreninta la knabino, kaj ekbatis per la mano inter li kaj ŝi, dividante ilin. — For! ĉu vi ne vidas, ŝi estas via fratino! Ĉiuj ili estas ja al iu fratinoj. Jen ankaŭ tiu, fratino Fransuazo. Ha, ha, ha... ekploregis li per tiaj ploroj similaj al ridego kaj eksanceliĝis, levis la manojn kaj sinĵetis per la vizaĝo al la planko, batante sin en ĝi per la manoj kaj piedoj, raŭkante kiel mortanta.

— Ni kaŝigu lin dormi, diris unu el la kolegoj; oni ensidigos lin ankoraŭ en la malliberejon.

Ili levis Selestinon, entrenis lin supren, en la ĉambron de Fransuazo kaj metis lin sur ŝia lito.

Tradukis **B. Spektor**.

ANONCOJ.

Mi havas la honoron sciigi amikojn esperantistojn, ke mi akceptas mendojn de la plej diversaj specoj da presajo en la lingvo Esperanto por presejo esperantista en Hungarujo. Tiu ĉi presejo plenumas ĉiujn mendojn de esperantistoj dum mallonga tempo kaj prenas la plej malgrandan pagon. Ĝi rekomendas al Vi vizitkartojn (kun la transsendo per pakajo rekomendita — 90 kop. por cento), leterpaperojn, kovertojn, poŝtkartojn, librojn, anoncojn kaj cet. Mi sendas al ĉiu volante la detalan anoncon en Esperanto post la ricevo de poŝtsigno en 3 kop. Por la respondo volu almeti poŝtsignon.

Mia adreso: Rusujo. St. *Ŝestilino*. Rybinsko-Bologovskoj ĵel. dorogi. Selo *Vereteja*.
al **Ivan Ŝirjaev**.

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉeteblaj:

La literaturisto kaj lia fianĉino. Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 65 centimojn.

Du Mirrakontoj de *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 40 centimojn.

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la *Societo "Espero" en S. Peterburgo*. Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la Klubo Esper. Upsala, kiel ankaŭ ĉe D-ro Zamenhof.